

LANGUAGE  
COMMUNICATION  
INFORMATION

Edited by

ILONA KOUTNY

IDA STRIA

ZESPÓŁ REDAKCYJNY / EDITORIAL BOARD

Jerzy Bańcerowski  
Probal Dasgupta  
Sabine Fiedler  
Ilona Koutny (przewodnicząca)  
Mária Ladányi  
Aleksandra Matulewska  
Nguyen Chi Thuat  
Piotr Nowak  
Paweł Nowakowski  
Kyong-Geun Oh

REDAKTOR JĘZYKOWY / LANGUAGE EDITOR

Michael Farris

Redakcja rocznika *Język. Komunikacja. Informacja* deklaruje, że wersja papierowa czasopisma jest jego wersją referencyjną

The editors of this journal declare that the printed version should be used in citations

RECENZENCI TOMU / VOLUME REVIEWERS

Héctor Alós i Font, Věra Barandovská-Frank, Sabine Fiedler, † Zbigniew Galor, Norbert Kordek, Ilona Koutny, Piotr Nowak, Anna Pietryga, Humphrey Tonkin, Tomasz Wicherkiewicz, Tadeusz Zgółka

Czasopismo figuruje na liście punktowanych polskich czasopism naukowych z zakresu nauk humanistycznych i społecznych (5 punktów)

The journal has been accredited by the Polish Ministry of Science and Higher Education (5 points)

PROJEKT OKŁADKI / COVER DESIGN

Wydawnictwo Rys

Copyright © by Wydawnictwo Rys, Poznań 2017

Printed in Poland

ISBN 978-83-65483-56-0

ISSN 1896-9585

WYDANIE / EDITION

Wydawnictwo Rys  
Dąbrówka, ul. Kolejowa 41, 62-070 Dopiewo  
tel. 600 44 55 80  
e-mail: rysstudio@o2.pl  
www.wydawnictworys.com

## Contents

From the Editors .....	12
<b>Language Policy</b>	
MARIA KURPASKA The effects of language policy in China .....	14
TAMAR SUKHISHVILI The Georgian Language: Threats and Challenges .....	25
WALTER ŹELAZNY Language Policy of New Brunswick .....	38
DETLEV BLANKE Communication in Europe – some language policy aspects.....	50
MACIEJ PAWEŁ JASKOT An outline of the multilingual policy of the Kingdom of Spain .....	74
FÉLIX MANUEL JIMÉNEZ LOBO Why is Spanish not used as an interlanguage in the Phillipines? .....	88
BAŞAK ARAY Sylvia Pankhurst and the international auxiliary language.....	103
MICHAEL FARRIS Esperanto and the Market State .....	113
VICENTE MANZANO-ARRONDO The discourse of language suppression and the contemporary university.....	121

VICENTE MANZANO-ARRONDO

## Lingva subpremanta diskurso kaj nuntempa universitato

**Abstract (The discourse of language suppression and the contemporary university).** The spread of English both inside and outside of universities can be regarded as a consequence supported by a discourse of power. Here, this will be referred to as DANPI (*Diskurso pri la Angla lingvo kiel Necesoj kaj Profitindaĵoj Individuaj* – Discourse on English as an Individual Need and Means-of-Enrichment). There are five components to this discourse: (1) Learn English or perish!; (2) You are the only person who still doesn't know this language; (3) Use your own resources to solve this problem!; (4) Don't worry: English will open amazing doors for you; and (5) What ethical problem? English is neutral!

DANPI carries important nuances in universities, where those inside demonstrate more individualized ways of thinking than those outside the university do. Apart from the importance of DANPI on its own, this discourse plays its main role inside of a more complex process: language suppression. Therefore, this article will describe this last concept and the role that DANPI plays within it. In order to operate outside a purely theoretical dimension, I have two proposals. The first contains a number of actions that could be undertaken to solve the problem at the university level. That is, it is important to (1) highlight the fact that all native written languages are useful in carrying out normal university business; (2) stress the importance of research and instruction on concrete problems in local environments where doubtless the local language is more useful; (3) facilitate the use of Esperanto at universities when the international dimension is important; and (4) find effective solutions for those situations when those in a university environment feel the need to communicate internationally without using an international language. The second proposal is a collection of hypotheses which are worthy of research in order to improve knowledge and action for the goal of working together to highlight a freer and more socially just university, primarily though not entirely related to language issues.

**Abstrakt (Represyjny dyskurs językowy i współczesny uniwersytet).** Rozpowszechnianie języka angielskiego na uniwersytetach i poza nimi można postrzegać jako konsekwencję dyskursu potęgi. Tu będzie on określany jako DANPI (*Diskurso pri la Angla lingvo kiel Necesoj kaj Profitindaĵoj Individuaj*, tj. 'dyskurs o języku angielskim jako osobistej konieczności i zysku'). Dyskurs ten składa się z pięciu elementów: (1) *Ucz się angielskiego lub przepadnij*; (2) *Jesteś jedynym człowiekiem, który wciąż nie zna tego języka*; (3) *Użyj swoich osobistych zasobów, aby rozwiązać ten problem*; (4) *Nie cierp: angielski otworzy dla Ciebie niesamowite możliwości*; i (5) *Jaki problem etyczny? Sprawa jest przecież neutralna!*

DANPI aktyvuje waĝne niuance na universytetach, kiujn membroj montras pli indifejn ol personoj ne ligitaj al universitato. Pasmaltrankviligante la signifon de DANPI en si mem, la diskurso tiam akiras sian ĉefan rolon en pli komplikita procezo: la reprimado lingva. Pro tio en ĉi artikolo skizite estas tiu koncepto kaj la maniero, kiel DANPI plenas en ĉi rolo. Por ne lasi la aferon nur en la teoreta, ĉi artikolo prezentas ĉi proponoj. La unua estas la listo de agadoj, kiujn en ĉi maniero solvas tiu problemo en universitato; tio signifas, ĉi estas (1) la prezento de ĉi lingvoj indigenaj kiel la ĉi lingvoj komunaj; (2) la emfazo de la signifon de la esploro kaj la instruado de ĉi problemojn en ĉi medioj, kie la lingvo indigena estas la ĉi lingvo; (3) la faciligo de la lingvo indigena, kie ĉi estas la ĉi lingvo; kaj (4) la trovo de la ĉi solvo por ĉi situoj, kie la sciencistoj sentas la bezonon de la komunikado ĉi lingvo indigena. La dua propono estas la listo de hipotezoj, kiujn ĉi estas neceso testoj por la plibonigo de la agadoj kaj la ĉi lingvo indigena. La ĉi lingvo indigena estas pli ĉi lingvo indigena, kie ĉi estas la ĉi lingvo indigena.

## 1. Enkonduko

Nuntempe, la scienco publikigita ĉi lingvo indigena estas ĉi lingvo indigena, kie ĉi lingvo indigena estas ĉi lingvo indigena. Ĝi estas ĉi lingvo indigena, kie ĉi lingvo indigena estas ĉi lingvo indigena. Ĝi estas ĉi lingvo indigena, kie ĉi lingvo indigena estas ĉi lingvo indigena.

Por bone kompreni la kernon de la afero, ĉi lingvo indigena estas ĉi lingvo indigena, kie ĉi lingvo indigena estas ĉi lingvo indigena. Ĝi estas ĉi lingvo indigena, kie ĉi lingvo indigena estas ĉi lingvo indigena. Ĝi estas ĉi lingvo indigena, kie ĉi lingvo indigena estas ĉi lingvo indigena.

## 2. Kio estas diskurso

Martín (2014) diferencigas du manierojn pensi pri tio kio estas diskurso: (1) Kiel aranĝo de frazoj, kiu povas esti analizata kiel kohera aro da lingvaj fragmentoj; kaj (2) Kiel ilo por doni socian sencon. Laŭ la dua versio, *diskurso* temas pri bone pripensita argumentaro, kiu laboras en socia kunteksto kaj kreas realon (Fernández 2003), ekzemple instruante pri tio kio estas kaj kio ne estas socia problemo (Scollon 2003). Ĉar la diskurso kreas realon ekde la elekto de la problemo, ĝi ne povas esti neŭtrala (Rapley 2014). Male, kaj la respondeco kaj la profito rilatitaj al diskurso ĉefe apartenas al homoj, kiuj estas plej potenĉavaj (Muehlenhard kaj Kimes 1999). Do, ŝajnas ke diskurso estas potenĉava ilo mane de potenĉava tavolo.

De tiu vidpunkto aperas *Kritika Analizo de Diskurso*, kiu ne nur temas pri simpla analizado, sed pri analizagado por kunlabori solvi kelkan konkretan maljustecon. Laŭ tiu metodo, la esploristo aŭ esploristaro (1) elektas diskurson, kiu daŭrigas maljustecon; (2) analizas ĝin montrante, kiel ĝi funkcias en la homa menso; kaj (3) klopodas ĥspiri sociajn ŝanĝojn danke al laboro farita (Meyer 2003). Tiel, diskurso ne estas nerezistebla rimedo por kontroli mensojn, sed potenĉava ilo, kiu allogas individuojn por rigardi la mondon per konkretaj okulvitroj kaj kohera konduti. Alivorte, diskurso estas ideologia kreaĵo, ĉar ideologio estas maniero (1) rigardi la mondon, tio estas interpreti ĉion, kion oni atentis el la okazaro; (2) preferi konkretan mondon antaŭ eblaj aliaj danke al specifa valoraro; kaj (3) kohera konduti laŭ tiaj rigardmaniero kaj prefermaniero (Manzano-Arrondo 2017b). Tiel, diskurso:

1. Elektas problemon (realan aŭ imagan). Ĉiu elekto estas ago. Oni iel konstruas tion, kion oni elektas, ĉar la afero ne estas tiom simpla kiel elekti ion el eblaro. La ebloj kutime ne antaŭe ekzistas, sed ofte ili naskiĝas samtempe kiam ili estas elektitaj.
2. Priskribas la elektitan problemon. La priskribo ankaŭ enhavas klarigojn. La ricevanto scias danke al diskurso, kio okazas kaj kial.
3. Aranĝas la respondecojn. La homoj estas engrupigitaj: kelkaj homoj kreas la problemon, kelkaj suferas la konsekvencojn, kelkaj estas spektantoj, kelkaj havas la rolon solvi ilin. Kelkaj roloj estas elstarigitaj, dum aliaj estas supozitaj, kovritaj, miksitaj ktp.
4. Faras alvokon. Ĉiu ricevanto havas gvidon por rekoni sin mem ene de la rolaro. Kutime, ĉiuj ricevantoj estas alvokitaj kaj allogitaj por fari la samon. La ceteraj roloj partoprenas la diskurson por klarigi pri la Tuto; kaj oni povas klare scii, ke tiaj roloj ne estas por si mem.
5. Duonigas la estontecon. Povos okazi nur unu el nur du ebloj: aŭ vi ĉiuj obeas kaj prenas vian respondecon tiamaniere ke la problemo solviĝos, aŭ ni suferados ĝian plifortigon. Tio okazas pri rekonebla kolektiva afero. De la kapitalisma kaj individualisma pensmaniero, ĉiu problemo estas individua. Kohera, pri la estonteco ĝiaj diskursoj prezentas du eblojn por vi, ulo: aŭ vi savos vin kaj atingos sukceson, aŭ vi suferados kiel neutila kaj aĉa malsukcesulo, kiu ne rajtos peti nek havi helpon, kaj kiu trenos sian familion ĝis la nuleco.

6. Aranĝas la profitojn. La diskursa celo estas daŭrigi la socian ordon, tiamaniere ke kelkaj tavoloj ne partoprenos konkretajn profitojn, sed kelkaj aliaj jes.

En tia kunteksto, multaj agentoj kondutas sen intence deziri nek scii pri la konsekvencoj. Tiel, ekzemple, la amaskomunikiloj ludas sian rolon ripetante kaj fortigante la diskurson, sen pripensi ĝin (Almiron kaj Jarque 2008). Kiam la diskurso eniras pozitivan ciklon, preskaŭ ĉiuj finiĝas kiel respondecoj de ĝia sukceso; rezulte la plimulto el la energio bezonata por daŭrigi la diskurson estas donata de homoj, kiuj ne konscias pri sia rolo ene de tia rezulto. Laŭ Jost, Banaji kaj Nosek (2004) kutime kaj pere de tia nekonscio, la viktimoj subtenas la subpremadon danke al siaj propraj energioj. Krom la menciitaj, pluraj aŭtoroj proponas metodojn, teknikojn aŭ helpilojn por plibonigi la komprenon de tio kio okazas ĉirkaŭ la daŭrigo de maljustecigaj diskursoj. Ekzemple Pratto, Sidanius, Stallworth kaj Malle (1994) ofertas la koncepton *mito*, kiel kernan eron de tiaj diskursoj. Kelkaj ekzemploj de oftaj diskursaj mitoj estas la meritokratio (Liu 2011), la sukcesa homo (Balestena 2001), la memsufiĉa persono (Grinberg 2009) aŭ la malabundo (Naredo 2013). De tiu vidpunkto, oni povas rekoni mitigadon ĉirkaŭ la angla, kies ĉieesto permesas kontroli la homan konduton sen la aktivado de homa konscio.

### 3. Jen necesa lingvo

La angla nuntempe estas la lingvo la plej uzata, kiel unua aŭ dua lernata. Tio metas ĝin ne kiel alternativon aŭ trejnadan kompletigaĵon, sed kiel individuan postulon por atingi plenan disvolviĝon pri multaj flankoj el la vivo. La nuntempa labormerkato, ĉiufoje pli postulema, malmola kaj konkurema, kie la entreprenoj internacieagadas, igas la bezonon akiri internacian lingvon „lingua franca”, pri kio la angla prenis tiun rolon, per la uzado farita de vasta diverseco da homoj, sendepende de ilia deveno aŭ lando<sup>1</sup> (MECD 2012).

Tia teksto bone montras la kutiman pensmanieron pri la rolo de la angla. Tion verkis oficiala hispana institucio, kiel enkondukon de oficiala libro. Hodiaŭ oni povas kolekti preskaŭ senfinan aron da publikaĵoj, kiuj temas pri la angla kiel lingvafrankao kaj ĝia nuntempa internacia graveco. Tamen, ne same okazas pri la analizo de la diskurso, kiu kreas kaj daŭrigas tiun pensmanieron. Sen la celo tro eniri en la kernon de la afero, tiu ĉi paragrafo prezentas aranĝon da eroj, kiujn oni povas trovi en multaj tekstoj defendantaj la diskurson. Tiuj eroj konsilas nomi la aron per DANPI: Diskurso

<sup>1</sup> Origine hispane: „El Inglés es el idioma más empleado como primera o segunda lengua en la actualidad, situándolo no solo como una alternativa o complemento a la formación, sino como una exigencia a nivel personal para lograr un desarrollo completo en múltiples campos de la vida. El actual mercado laboral, cada vez más exigente, duro y competitivo, en donde las empresas operan a nivel internacional, establece la necesidad de adquirir una lengua internacional „lingua franca”, en la que el Inglés ha adquirido este rol al ser utilizado por una amplia gama de personas, independientemente de su origen y nación.” Traduko de la aŭtoro.

pri la Angla lingvo kiel Neceso kaj Profitindaĵo Individuaj. DANPI ĉeestas ne nur ene de sciencaj publikaĵoj kaj politikaj diskursoj, sed ĉefe en amaskomunikiloj, blogoj kaj retpaĝoj. Eble tro simpligita, DANPI konsistas el:

1. *Lernu la anglan aŭ malaperu.* Tiu lingvo havas nek alternativon, nek rivalon. Ĝin oni trovas ĉie, ĉefe pri la serĉado de laboro. Ĉar havi postenon estas neceso por garanti la propran vivtenon ene de merkata sistemo, ĉio kio ŝajnas maldiskutebla por havi postenon, ankaŭ ricevas la plej altan gravecon. Do, se oni nepre bezonas la anglan por tia atingo, oni ne havas alternativojn (Alandete 2016) kaj neniu rajtas dubi pri tio (Ramírez 2001).
2. *Vi estas la nura homo, kiu ankoraŭ ne posedas tiun lingvon.* Ĉiuj jam regas la anglan aŭ jam estas sur la vojo por atingi ĝin. Se vi ne faras same, vi izoliĝos. Tiu potenĉava mesaĝo ne estas rekte dirita en la teksto, sed klare konkludebla en la ricevanta menso. La konkludo alvenas de la jena ideo: tiu lingvo estas ĉie, ĉar ĉie oni trovas homojn, kaj ili ofte kaj facile uzas la anglan por interkomunikiĝi. Pli-malpli la duona parto el la mondo parolas angle (Regenbig Group 2017), aŭ ĉiuj junuloj kaj preskaŭ ĉiuj ceteraj homoj (Vaughan 2016). Plie, homo, kiu ne parolas angle, estas simila al analfabeto (Stainer 2017); aŭ ŝli estas neniu en la 21a jarcento (Gusano 2017). Tipa homo kutime ne ŝatas senti sin izolita aŭ tro malsama rilate al la plimulto (Frith 2014, Turner 2005, Young 2004). La diskurso profitas el tio kaj finiĝas igante fortan senton de individua izoleco.
3. *Uzu viajn personajn rimedojn por solvi tion.* Kvankam la diskurso kutime uzas referencojn al tutmondiĝo kiel unua kaŭzo, ĝi baldaŭ konkretiĝas en la individua neceso atingi la celon, kiu bezonas individuajn penon, monon, tempon ktp. Alivorte: La afero ne temas pri socia subpremado, sed pri individua defio aŭ individua postulo (MECD 2012, Oller 2016, Ruiz 2017). Logike, vi ne rajtas uzi komunajn rimedojn nek peti ilin por solvi vian individuan mankon.
4. *Ne suferu: la angla malfermos por vi nekredeblajn pordojn.* Ekzistas multaj pozitivaj flankoj en la vivo, kiujn vi atingos danke al tiu lingvo. La listo estas nekredeble longa (Mahu 2012). Kelkaj kialoj por pozitive lerni la anglan estas logikaj kaj kompreneblaj. Sed aliaj temas pri tro ĝeneralaj aferoj, kiuj povas rilati al preskaŭ ĉiuj lingvoj, aŭ pri aferoj ne sufiĉe ligitaj al la lingva dimensio. Ekzemple, Univerisia (2015) defendas, ke la angla permesas plibonigi la tempan senson, eskapi de Alchajmero, aŭ savi la propran familion. Aliaj aldonas enamiĝi en la tutan mondon (Alandete 2016), esti plaĉa homo (Vaughan 2016), plibonigi la sociajn rilatojn (Caro 2015), diri la samon per diversaj lingvaj konstruaĵoj (Tom 2016), kreskigi la memfidon kaj la kreivecon (Aguilera 2008) ktp.
5. *Kiu etika problemo? La afero estas neŭtrala!* La afero temas nur pri lingvo, nenio plu nek pli. Se ne estus la angla, estus alia. Sed estas la angla. Kvankam kelkaj tekstoj rekte mencias la neŭtralecon (Ferguson 2007), plej kutime estas menciit nenion pri tiu temo. Do, la silento pri la konsekvencoj, kiuj devenas de la lingva hegemonio, laboras por faciligi naivan mensan bildon, kiu estas ligita nur al la lingva dimensio (Macedo, Dendrino kaj Gounari 2005) kaj silentigas la fortan rilaton inter lingvo, pensmaniero kaj kulturo (Koutny 2005).



#### 4. Kio okazas universitate rilate al hegemonia lingva diskurso

Kiam DANPI eniras la universitaton, aldoniĝas kelkaj nuancoj al la menciitaj eroj. La plej grava el tiuj, estas la premo publikigi angle en revuaro kontrolita de unu – Thomson & Reuters – aŭ du – kaj Elsevier – internaciaj entreprenoj (Manzano-Arrondo 2017a). Sed antaŭ ol rekte eniri tiun dimension, oni devas almenaŭ iomete scii pri tio, kiel funkcias la nuntempa universitato cirkaŭ la imago kaj la realo de universitatano.

Mi nomas *akademiano* homon, kiu laboras universitate samtempe kiel instruisto kaj esploristo. Kiel akademiano ŝli iel akceptas komunan bildon kia devas esti tiu, kiu laboras pri ambaŭ flankoj. La tradicia bildo priskribas homon, kiu laboras por kreskigi la sciaron pere de altnivelaj esplorado kaj instruado (Quinn 2012). Tiu laboro devas esti farita ene de klara liberiga etoso (McArthur 2011). Alivorte, la universitatanoj devas kaj esti kaj senti sin liberaj (Barnhizer 1993). Danke al tia libereco, la universitatanoj decidas, kion esplori, kiun enhavon plani por sia instrulaboro, kaj kiel fari ĉion ĉi.

Tamen la realo montras tre malsaman situacion. Por kompreni ĝin, oni devas kalkuli ne nur la fortan sisteman premon universitate, sed ankaŭ la tipan nuntempan universitatan personecon (Manzano-Arrondo 2015a,b). La universitatanoj devenas de edukada sistemo, kiu estas kutime priskribita kiel homogeniga procezo (Martí, Martí, Vargas kaj Moncayo 2014, Tedesco 2004). En la plej alta pozicio troviĝas studentoj. Por sukcesi en tia longa procezo, ili bone lernas kaj donas tion kion la sistemo volas de ili, tio estas ili bone lernas kiel sukcesi ene de la edukada sistemo. La universitatanoj estis lertaj studentoj, kiuj eĉ lernis adaptiĝi plu ĝis la atingo de universitata posteno. Iel dirite, ili fine kaj ĉefe rigardas sin mem (Martín-Baró 1975) kaj penas pri sia individua sukceso kiel lertaj adaptiĝuloj. Kelkaj publikaĵoj priskribas, kiel tiu konduto interagas kun la nuntempa kapitalisma etoso (ekzemple Amigot kaj Martínez 2013, Dávila 2014, Gómez kaj Jódar 2013, Greenwood 2012). Kutima rezulto estas la elstarigo de universitatanoj, kiuj kondutas kiel ambiciaj konkurantoj serĉantaj plibonigi sian situacion ene de la universitato (Manzano-Arrondo 2012, Roberts 2017, Rodríguez 2017), kaj penante atingi subtenitajn projektojn, kiuj donos monon, necesan kaj por atingi datumojn kaj por pagi anglajn tradukaĵojn por publikigi. La angle farotaj publikaĵoj permesos kreskigi la individuajn meritojn (Bidlake 2008) por denove lukti kontraŭ aliuloj, kiuj same faras en la universitato de la malabundo. Ne temas nur pri la atingo de materialaj profitoj, kiel mono por projektoj aŭ pli bona universitata posteno, sed ankaŭ pri prestiĝo, ĉar pluraj esploroj montras ke la uzo de la angla, per si mem, aldonas valoron al sciencaj publikigo aŭ renkontiĝo (Ammon, 2006a).

Konsekvence, DANPI rapide disvastiĝas universitate. Homoj, kiuj ĉefe zorgas pri siaj individuaj celoj, ne levas barilojn kontraŭ tiu disvastiĝo. Male, ili fortigas la sisteman funkciadon pere de adaptiĝo kiel plej eble sukcesa. Por tio, ili devas akcepti simpligitan klarigon por protekti sin mem pri la akuzo de memsklaveco aŭ de malkohero rilate al la tradicia menciita universitatana bildo. La simpligo ĉefe konsistas el konkludo, ke oni devas publikigi angle por maksimumigi la sciigon de la propraj sciencaj malkovraĵoj, kaj ke tio, la maksimumigo, estas la ĉefa celo de ĉiu bona akademiano.

Laŭ la priskribo de Alcalde (2016): la sciencistoj klopodas publikigi nur angle por ke ili estu legotaj de la ceteraj; pro tio, ili nur legas angle; do, kiu ne same faras, ne estos legita. Al tiu priskribo oni devas aldoni, ke ne sufiĉas publikigi kaj legi angle, sed eĉ fari tion nur pri la revuaro kontrolita de la menciitaj internaciaj entreprenoj. Do, kiu ne publikigas tiel, ne estos legata (Callaham, Wears kaj Weber 2002, Lange 2002, Manzano-Arrondo 2015a, 2017a). Rezulte, la akademianoj kutime ludas tiun ludon sen kredi ĝin. Tia konduto estas nomata *kosmetika adaptiĝo* (Teelken 2012), *akademie ludi la ludon* (Cheng 2011), *akademia modo* (Temple 2005), aŭ *burokratisma kialaro* (Kreimer 2011). Bidlake (2008) aŭ Hamel (2007), inter aliaj, bone priskribas unu el la konsekvencoj de tiu konduto: la sciencaj revuoj rapide moviĝas ĝis la angla kiel nura lingvo permesata por publikigi, eĉ tiuj, kiuj temas pri lingva diverseco. La maniero fari tion ŝajnas trairi kvar momentojn: (1) publiki per la gepatra loka lingvo; (2) akcepti kaj la gepatran kaj la anglan; (3) konsili uzi la lastan; (4) nur ĝin permesi.

En tiuj individua kaj kolektiva procezoj, la diskurso ne ofertas plenan logikon. Ĝi asertas, ke de ne-A (ne publikigi angle) sekvas ne-B (la publikaĵo ne estos legata). Tio ne logike garantias, ke de A sekvas B. Alivorte, se oni publikigas angle, ĉu la publikaĵo estos legita? Eble la plimulto el la universitataj tekstaj produktaĵoj mortas preskaŭ ne legitaj, eĉ se ili angliĝus. Plie, pri multaj aferoj, la legado estus pli facile disvastigita per la denaska lingvo en la lokaj kunteksto. Kompreneble, la lingvo ne estas la nura kialo, sed unu el pluraj kialoj, kiuj povas klarigi ne nur tion kial publikaĵo estas legata aŭ iel utila, sed ankaŭ kial ĝi estas menciita en aliaj publikaĵoj.

Konklude, DANPI kune kun la normiga tutmondiga premo, trovas en la akademianoj taŭgan kampon por disvastiĝi kaj fortigi sin. La kutima individua pensmaniero kaj la persona historio de sukcesa adaptiĝo estas malfacile plibonigebla paro da helpantaj trajtoj por la universitata disvastigo de la angla.

## 5. La koncepto *subpremado* kiel ilo por kompreni la aferon

Kompreneble, diskursa ĉeesto ne sufiĉas por krei, nek ŝanĝi la realon. La rezulto estas tempa konkretaĵo, kiu aperas danke al amaso da fortoj, kiel estas la oficiala normigo, la merkata sistemo aŭ la grupa premo. Male al la izola diskursa afero, la subpremado estas koncepto, kiu sufiĉas por kompreni multajn sociajn procezojn, kiuj igas kaj daŭrigas maljustecojn. Ene de la subpremantaj procezoj, la diskursoj trovas sian rolon per la aldono de bone aranĝita aro da signifoj. Tiu aranĝo sekvas la ses supre menciitajn punktojn pri la diskursigo. Tiu ĉi paragrafo celas klarigi, kiel DANPI eniras pli kompleksan fenomenon, kiun oni povas nomi *lingva subpremado*. Do, antaŭ ol eniri tiun konkretaĵon, oni bezonas almenaŭ iomete scii kio ĝenerale estas subpremado.

Danke al la kerno de la proponoj faritaj de Banja (2001), New (2001), Kumashiro (2000), Postmes kaj Smith (2009), Watts, Griffith kaj Abdul-Adil (1999), Young (2004)

kaj Zutlevics (2002) oni povas difini subpremado kiel la daŭra praktiko de sociaj funkciadoj, kiuj damaĝas konkretajn tavolojn, dum favoras aliajn per kialoj, kiuj havas neniun rilaton kun la kondutoj, sed kun la grupa aparteno aŭ socia deveno, tiamaniere ke la subpremataj tavoloj suferadas la malatingon de gravaj vivaj celoj. Sintezo kaj alivorte, la antaŭa difino povas esti reskribita ĉi tiel: *la subpremado estas sociaĵo, kiu malpermesas al kelkaj homoj atingi gravegajn celojn, kiuj rilatigite kaj samtempe estas faciligitaj por kelkaj aliaj.*

De tiu reskribado, oni povas pli facile rimarki ĉefe du gravajn mankojn. La unua temas pri la celo: Kial la homoj celas tion? Ĉu ĝi vere estas natura neceso? Kiu atingas profiton de tiu konduto? Certe, multaj celoj ne bezonas tro da klarigoj por esti akceptitaj kiel gravaj por ĉiuj. Sed pri la plimulto da *sociaj bezonoj*, oni rajtas dubi pri ilia kvalito de nepra neceso. La subpremado konsistas ne nur el konstruado de bariloj, kiuj malpermesos atingi celojn, sed ankaŭ starigi celojn, kiuj daŭrigos la okupiĝon kaj suferadon de malpotenchavaj tavoloj. La alia manko temas pri tio kiu pagas la celon. Kvankam celoj, bariloj kaj klarigoj havas socian devenon, la subprematuloj fine sentas, pensas kaj agas nur pri la izola individua dimensio: „mi devas uzi miajn proprajn rimedojn – tio estas, penson, tempon, energion, monon, penon – por solvi tiun problemon, kiu estas *mia* problemoj”. Do, tiu grava nuanco ŝajnas magiaĵo: La socia kunteksto starigas vastan neceson, sed la nura videbla dimensio estas la individua, tiamaniere ke la personoj, kiuj ne atingos la individuan celon pere de siaj individuaj ebloj, grandigos la aron da malsukcesuloj. Tia nivela afero – ekde la sistema ĝis la individua – ne anstataŭas la kuntekstan premon, sed pligrandigas ĝian efikon danke al aldono de individuaj celoj kaj rimedoj. Alivorte, la rezulto alvenas ĉefe danke al tri devenoj: (1) strukturaj aŭ sistemaj premantaj decidoj kiuj altrudas uzi la anglan, (2) kompleksa aranĝo da premioj kaj punoj kiuj faciligas rimarki la „sukcesan vojon”, kaj (3) individuaj emoj por ne nur transvivi sed ankaŭ atingi profitojn, kiun mi nomos IVF (vidu poste).

Rezulte, la lingva subpremado povas esti sinteze priskribita ĉi tiel:

– *Aperas gravega celo,*

kaj DANPI kaj la normigo atingas, ke multaj homoj deziregu lerni la anglan, ĉar ili rimarkas pli kaj pli, ke iliaj denaskaj lingvoj ne sufiĉas por plene vivi en scienca mondo.

– *kies atingo bezonas superi malfacilajn barilojn,*

Lerni fremdan lingvon estas tre malfacila tasko por ĉiuj. La plenkreskuloj ofte lernas per sistema metodo, kaj bezonas logikon kaj regulecon. Tamen, la angla enhavas tro da esceptoj, multekostas, ŝtelas multe da tempo, ktp.

– *kiuj ne leviĝas por ĉiuj.*

Nur kelkaj homoj havas sufiĉe bonan memoron, disponeblan tempon, oportunan kuntekston, kaj monon por la celo lerni la anglan, ĝis la posedo de tiu lingvo. Plie, dum la plimulto klopodas lerni la lingvon, la denaskuloj venkas en la agresema universala merkato, kiun ni helpas konstrui.

Fine, (1) la denaskuloj suferas nek la celon nek la barilojn; (2) la malplimulto el la ceteraj havas bonajn situacion aŭ rimedaron por sukcesi; sed (3) la ega plimulto plene

suferadas pro la planeda lingva subpremado, ofte ne konscias pri tio, kaj intense laboras por fortigi la maljustecon per siaj propraj rimedoj.

Normigo kaj DANPI kuniĝas en subpremanta fenomeno por atingi, ke multaj homoj sentu sin handicapuloj meze de mondo, kiu preskaŭ subite ne permesas la gepatrajn lingvojn por plenece vivi.

## 6. Kelkaj celoj kaj kvar esplorindaj hipotezoj

Danke al normigo kaj DANPI, amaso da individuaj energioj laboras por daŭrigi la universitatan homogenon, tiom sukcese, ke universitata lingva subpremado klare kreskas. Malgraŭ tio kaj kiel oni antaŭscias, nek la homaro nek la universitato estas tute homogenaj.

Estas ne malfacile rimarkebla, ke la plimulto sekvas aŭ klopodas sekvi la ludregulojn supre priskribitajn. Sed ankaŭ la liberigaj sperto, konduto kaj animo ĉeestas. Pluraj universitatoj decidas ne ludi tiun rolon kaj labori por savi kaj la universitaton kaj sian gepatran lingvon. Kelkaj el tiuj movadoj estas iom konataj, ĉefe kiam la kerno temas pri la maniero taksi la universitaton. Ekzemploj estas la deklaroj de la urboj Talloires<sup>2</sup>, San Francisco<sup>3</sup> kaj Leiden (Hicks, Wouters, Waltman, Rijcke kaj Rafols 2015) aŭ la Deklaro de la Malperfekteco<sup>4</sup>. Pluraj aliaj universitataj alternativoj stariĝas por defendi la taŭgecon de ĉiu lingvo por sciencoj (Flores, Penkova kaj Román 2009, Manzano-Arrondo 2017a, Packer 2002, Sandoval kaj Aguado 2002). Do, ne nur alimaniere universitate kondukti eblas, sed ankaŭ okazas. Tiu aro da analizaĵoj kaj proponoj konsilas aranĝi celojn por pensi alian eblan universitaton koncerne la lingvan aferon. Tia horizonto povus konsisti el:

1. Elstarigi ĉiun gepatran skriban lingvon kiel taŭgan por okupiĝi pri la tipaj universitataj aferoj.
2. Substreki la gravecon esplori kaj instrui pri konkretaj problemoj en lokaj medioj, kie sendube la loka lingvo estas la plej taŭga.
3. Faciligigi la universitatan uzadon de Esperanto, kiam la internacia medio gravas.
4. Aranĝi efektivajn solvojn por tiaj situacioj, kiam universitatoj sentas bezonon komuniki internacie, sen nepre uzi internacian lingvon.

Ammon (2006a,b) proponas klasifikon por lingvaj sciencaj komunumoj per tri kategorioj: (1) angle gepatra, (2) ne angla sed sufiĉe internacie disvastigita, kiel la franca, la germana aŭ la hispana, kaj (3) lingvaj komunumoj kiuj ne havas internacian rekonon kiel sciencaj lingvoj. Malgraŭ tia klasifiko utilas por pluraj celoj, pri la ĵus priskribita horizonto ĝia utilo konsistas el defendo ke ĉiu skriba lingvo atingi la rolon de internacia, nome ĉiuj partoprenos la duan grupon.

<sup>2</sup> <http://talloiresnetwork.tufts.edu/>

<sup>3</sup> Declaration of Research Assessment of San Francisco (DORA, <http://www.ascb.org/dora/>)

<sup>4</sup> <http://www.sauvonsluniversite.com/spip.php?article6751>

### *Ĉefroleco de la emocioj*

Por ĉi tiuj celoj gravas ne nur racie pensi pri kialoj. En la fama Zamenhofs eseoj *Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia*, la aŭtoro kolektas aron da kialoj por scii, ke iutage Esperanto estos la internacia lingvo por la homara interkompreno. Malgraŭ ĝia enhavo povas esti kritikata kaj plibonigata danke al sperto amasigita ekde ĝia publikigo, temas pri fundamenta kolekto da kialoj por atendi ion, kio ne okazas. Esperanto povas esti la plej saĝa elekto por internacia komunikado danke al diversaj avantaĝoj rilate al flankoj lingva kaj politika, jam sufiĉe priskribitaj (Koutny 2005, Moya 2002, Neves 2003). Sed la afero ne temas pri kialoj; aŭ ne nur pri kialoj, sed ĉefe pri emocioj (Manzano-Arrondo 2017c). La universitata konduto ŝajnas racia. Sed ĝi nur ŝajnas. Pli trafe estus rigardi ĝin kiel emocian konduton.

Inter multaj teorioj pri la homaj necesoj, eble la plej nuntempe science disvastigata estas la modelo oferita de Deci kaj Ryan (2000), kiuj proponas tri interrilatajn erojn. Laŭ ilia modelo, ĉiu homo havas la bezonojn (1) rimarki sin memstara, (2) havi socian rolon aŭ senti sin agnoskata kiel lerta pri io, kaj (3) havi bonajn rilatojn kun la aliaj. Kvankam tiu mallongeco ne sufiĉas por scii pri la gravaj nuancoj de la modelo, eble ĝi sufiĉas por faciligi pensi pri la universitatoj kiel serĉantoj de memstareco, socia rolo kaj kontentigaj rilatoj. La tri kondukaj celoj temas ĉefe pri emocioj. La universitatoj ofte havas sukcesan menson, bonan cerbon por fari mirandaĵojn. Parto el tiu mensa potenco estas uzata por memliberigi de la akuzoj de sklaveco, obeo, memvendado ktp. Neniu ŝatas senti sin tiel. Do, kialaro povas havi malan efekton, ĉar ĝi povas igi, ke la universitato levu racian barilon por protekti sin pri tiaj kialoj, kiuj nepre alvenas kune kun implicita individua akuzo. Do, la hipotezo la estas, ke se oni klarigus pri la universitata lingva subpremado al sufiĉe granda kvanto da universitatoj, la plimulto el ili ne atakus la teorian modelon, akceptus ĝin, sed aldonus raciajn kialojn por emocie protekti sin per agoj kiel minimumigi la problemon, situigi sian respondecon for de si, nei la eblon solvi ĝin, aŭ klarigi, ke oni iumaniere obeas, sed ne fortigas la modelon. Alivorte, la racia klarigo havus preskaŭ niun praktikan konsekvencon.

### *Pri la rilato inter individua pensmaniero kaj la sukcesa disvastiĝo de la angla*

Freire (ekz. 2001) proponis, inter alie du gravajn ilojn por malrekte pensi pri tiu afero. La unua pensilo estas konsideri du ĉefajn pedagogiajn sintenojn pri la ĉeesto monde: (1) legi la mondon, tio estas kompreni ĝin, scii pri kio, kiel kaj kial okazas monde; kaj (2) skribi la mondon, tio estas agadi, igi aĵojn por kunlabori ŝanĝi la mondon. La dua pensilo estas ne akcepti, ke la mondo simple *estas*, sed ke ĝi *estas estanta*; alivorte la mondo iumaniere estas, sed alimaniere povus esti, ĉar tio, kio okazas, iel okazas pro la interveno de nia konduto. Ambaŭ iloj kunligiĝas por faciligi du manierojn ĉeesti monde aŭ du ideologiaĵojn: individuan vivprojektan fokusigon – IVF – aŭ zorgemon pri la komuna bono – ZKB.

Tiu ĉi studo supre menciis, ke la oficiala eduksistemo faciligas la elstarigon de homoj, kiuj bone scias kiel adaptiĝi por atingi sukceson. Do, kohere ili fortigas specifan senson por medie distingi la eblojn, kiujn oni devas profiti por sukcesi, kaj la minacojn, kiujn oni devas eviti por ne fali. Alivorte, tiu priskribo temas pri IVF. Kohere, la hipotezo 2a estas, ke la IVF-a ĉeesto estas pli facile rimarkebla en la universitato ol en la ĝenerala popolo. Pli konkreta, IVF konsistas en direkto „mondo → ulo”, per kio (1) oni akceptas ke la mondo estas, aŭ la aĵoj estas kiel ili estas; (2) do, oni ne konsideras ŝanĝi la mondon, sed nur povas legi ĝin por profiti ĝiajn eblojn kaj eviti ĝiajn minacojn; kaj (3) se oni havas vivan projekton, oni rajtas etike atingi ĝin en tiu mondo, kiu estas kiel ĝi estas.

La hipotezo 3a defendas, ke la IVF plifortigas la elekton de la angla, ĉar tiu lingvo nuntempe estas la plej internacie disvastiĝinta – la mondo tia estas –, kaj DANPI zorgas grandigi la imagon pri ĝia sukceso. Do, de tiu pensmaniero, nur unu eblo devenas: posedi la anglan kiel ilon por la individua viva projekto. Tiu pensmaniero emas ignori, minimumigi aŭ eĉ moki pri Esperanto kaj iu ajn propono, malsama al la hegemonia aŭ kutima ĉeesto.

La hipotezo 4a estas, ke la disvastiĝo de Esperanto paŝas kune kun la sento, ke oni estas libera homo, kiu povas kunlabori por ŝanĝi la mondon. Kial? Laŭ la priskribita universitata etoso, nur la homoj kiuj elektas ne sekvi IVF-on ankaŭ povus elekti lingvon kiel Esperanton, kiu ne promesas sukceson pri la nuntempaj universitataj celoj, eĉ kiu bezonas energion elprenatan de la bezonata por IVF-a sinteno. Kompreneble, la argumento ne estas ke la libereco direktos ĝis Esperanto, sed nur ke Esperanto povas havi lokon ene de la libereco. Alivorte, hodiaŭ la aferoj estas kiaj ili estas, sed por morgaŭ ni povos atingi, ke la mondo estu alie. Kohere, oni ne nur atentis pri kio okazas, sed ankaŭ pri tio kion oni deziras, ke ĝi okazu. Tiu priskribado temas pri konkreta akcepto de la direkto „persono → mondo”, kiu ĉi tie estas nomata ZKB. Tiel, Esperanto estus pli akceptata en grupo da aktivulaj universitatanoj ol en la ceteraj.

Kompreneble, la homoj ne estas facile klasifikeblaj. Oni malofte povas partopreni nur unu kategorion. Do, puraj tipaj universitatanoj estas malfacile troveblaj. Tamen, oni povas iel trovi ĉefrolecon de kelka emo antaŭ ol aliaj; ekzemple pli IVF ol ZKB, ene de individuo aŭ de grupo. Tiusence Manzano-Arrondo (2015b) empirie priskribas du profilojn klare distingeblajn ene de universitato, kaj rilatitajn al maniero reagi pri la nuntempaj tutmondaj universitataj ŝanĝoj: (1) homoj kiuj rekte obeas la novajn normojn, montras merkatan emon, kaj priskribas sin kiel realisman personon; kaj (2) homoj kiuj emas rezisti al la normoj konsiderataj kiel danĝeraj por la komuna bono, montras socian emon, kaj priskribas sin kiel idealisman personon. Kvankam la puraj kategorioj malkutime ekzistas, tiu esplorado montris, ke ankaŭ eblas bone klasifiki multajn universitatanojn en gravajn rolojn por kompreni la universitaton; ekzemple la esplorado malkovris, ke la unua grupo emas havi estraran postenon, dum la dua klare ne deziras tiel roli. Tiamaniere, la ĉefaj universitataj postenoj emas reprodukti la socian ordon. Same, esplori pri la rilato inter universitataj profiloj povus lumigi, kio okazas pri la lingva afero, kaj kion oni povas fari por faciligi ŝanĝojn.

## Bibliografía

- Aguilera, C. 2008: *Importancia de la iniciación a la lengua extranjera de la Educación Infantil*. <<http://www.encuentroeducativo.com/numero-1-noviembre-08/recursos-formacion-num-1/importancia-de-la-iniciacion-a-la-lengua-extranjera-de-la-educacion-infantil/>>
- Alandete, M. 2016: ¿Por qué queremos aprender inglés?. <<http://www.viu.es/ingles-certificado-b2-aprender/#/plus>>.
- Alcalde, J. 2016: Nañ demandoj pri lingva justeco en la fakliteraturo. En: J.A. Vergara & A. André (ed.): *Internacia Kongresa Universitato*. Rotterdam: UEA.
- Almiron, Núr & Jarque, J.M. 2008: Mito, digitalismo y convergencia tecnológica: discursos hegemónicos y economía política. *Quaderns del CAC* 31-32: 115-121.
- Amigot, P. & Martínez, L. 2013: Gubernamentalidad neoliberal, subjetividad y transformación de la universidad. La evaluación del profesorado como técnica de normalización. *Athenea Digital* 13(1): 99-120.
- Ammon, U. 2006a: Language Planning for International Scientific Communication: An Overview of Questions and Potential Solutions. *Current Issues in Language Planning* 7(1): 1-30. DOI: <http://dx.doi.org/10.2167/cilp088.0>
- Ammon, U. 2006b: Language conflicts in the European Union. *International Journal of Applied Linguistics* 16(3): 319-338. DOI: <http://dx.doi.org/10.2167/cilp088.0>
- Balestena, E. 2001: Ética del saber y de las instituciones. En N. Kisnerman (ed.): *Ética, ¿Un discurso o una práctica social?*. Buenos Aires: Paidós. 45-62.
- Banja, J. 2001: When harms become wrongs. *Journal of Disability Policy Studies* 12(2): 79-86. DOI: <http://dx.doi.org/10.1177/104420730101200204>
- Barnhizer, D. 1993: Freedom to do what? Institutional neutrality, academic freedom, and academic responsibility. *Journal of Legal Education* 43(3): 346-357.
- Bidlake, E. 2008: Whose Voice Gets Read? English as the International Language of Scientific Publication. *e-pisteme* 1(1): 3-21.
- Callaham, M., Wears, R.L. & Weber, E. 2002: Journal prestige, publication bias, and other characteristics associated with citation of published studies in peer-reviewed journals. *Journal of American Medical Association* 287(21): 2847-2850. DOI: <http://dx.doi.org/10.1001/jama.287.21.2847>
- Caro, M. 2015: *Los beneficios de estudiar inglés*. <<http://ideasqueinspiran.com/2015/09/22/los-beneficios-de-estudiar-ingles/>>
- Dávila, L.P. 2014: Políticas públicas en ciencia y tecnología. Participación pública para la construcción de una nueva república democrática de la ciencia. *Revista Cuestiones de Población y Sociedad* 6(6): 63-73.
- Deci, E.L. & Ryan, R.M. 2000: The „What” and „Why” of goal pursuits: human needs and the Self-Determination Theory. *Psychological Inquiry* 11(4): 227-268. DOI: [http://dx.doi.org/10.1207/S15327965PLI1104\\_01](http://dx.doi.org/10.1207/S15327965PLI1104_01)
- Ferguson, G. 2007: The global spread of English, scientific communication and ESP: questions of equity, access and domain loss. *Ibérica* 13: 7-38.
- Fernández, Fr. 2003: *Así son las cosas. Análisis del discurso informativo en televisión*. Jaén: Universidad de Jaén.
- Flores, A.M., Penkova, Sn. & Román, A. 2009: Once años de LATINDEX: una experiencia al servicio de las publicaciones científicas iberoamericanas. *Simbiosis* 6(1): 1-27.
- Freire, P. 2001: *Pedagogía de la indignación*. Madrid: Morata.
- Frith, Chr.D. 2014: Action, agency and responsibility. *Neuropsychologia* 55: 137-142. DOI: <http://dx.doi.org/10.1016/j.neuropsychologia.2013.09.007>
- Gómez, L. & Jódar, Fr. 2013: Ética y política en la universidad española: la evaluación de la investigación como tecnología de la subjetividad. *Athenea Digital* 13(1): 81-98.

- Greenwood, D.J. 2012: Doing and learning action research in the neo-liberal world of contemporary higher education. *Action Research* 10(2): 115-132. DOI: <http://dx.doi.org/10.1177/1476750312443573>
- Grinberg, S.M. 2009: Tecnología del gobierno de sí en la era del gerenciamiento: la autoayuda entre el narcisismo y la abyección. *Psicoperspectivas* 8(2): 293-308.
- Gusano, C. 2017: 5 razones por las que debes aprender inglés: ¿en serio necesitas (más) razones?. <https://es.babbel.com/es/magazine/5-razones-aprender-ingles>
- Hamel, R.E. 2007: The dominance of English in the international scientific periodical literature and the future of language use in science. *AILA Review* 20: 53-71. DOI: <http://dx.doi.org/10.1075/aila.20.06ham>
- Hicks, D., Wouters, P., Waltman, L., de Rijcke, S. & Rafols, I. 2015: The Leiden Manifesto for research metrics. *Nature* 520(7548): 429-431.
- Jost, J.T., Banaji, M.R. & Nosek, Br.A. 2004: A decade of system justification theory: accumulated evidence of conscious and unconscious bolstering of the status quo. *Political Psychology* 25(6): 881-919. DOI: <http://dx.doi.org/10.1111/j.1467-9221.2004.00402.x>
- Koutny, I. 2005: Interkultura komunikado en Eŭropo: la angla kaj esperanto kiel alternativaj komunikiloj. En: Ch. Kiselman (ed.): *Simpozio pri interkultura komunikado*. Dobrichovice: Kava-Pech.115-132.
- Kreimer, P. 2011: La evaluación de la actividad científica: desde la indagación sociológica a la burocratización. Dilemas actuales. *Propuesta Educativa* 36(2): 59-77.
- Kumashiro, K.K. 2000: Toward a theory of anti-oppressive education. *Review of Educational Research* 70(1): 25-53. DOI: <http://dx.doi.org/10.3102/00346543070001025>
- Lange, L.L. 2002: The impact factor as a phantom. Is there a self-fulfilling prophecy effect of impact?. *Journal of Documentation* 58(2): 175-184. DOI: <http://dx.doi.org/10.1108/00220410210425449>
- Liu, A. 2011: Unraveling the myth of meritocracy within the context of US higher education. *Higher Education* 62(4): 383-397. DOI: <http://dx.doi.org/10.1007/s10734-010-9394-7>
- Macedo, D., Dendrinos, B. & Gounari, P. 2005: *La hegemonía del inglés*. Barcelona: Editorial Graó.
- Mahu, D. 2012: Why is learning English so beneficial nowadays?. *Perspectives on Communication* 2(4): 374-376.
- Manzano-Arrondo, V. 2012: *La Universidad Comprometida*. Vitoria: Hegoa.
- Manzano-Arrondo, V. 2015a: Academia, evaluación y poder. *RASE* 8(2): 197-222.
- Manzano-Arrondo, V. 2015b: Activismo frente a norma: ¿quién salva a la universidad?. *RIDAS. Revista Iberoamericana de Aprendizaje Servicio* 1: 28-55.
- Manzano-Arrondo, V. 2017a: Hacia un cambio paradigmático para la evaluación de la actividad científica en la Educación Superior. *Revista de la Educación Superior* 46: 1-35. DOI: <https://doi.org/10.1016/j.resu.2017.08.003>
- Manzano-Arrondo, V. 2017b: Ideología y aversión ideológica. *Revista Internacional de Sociología* 75(3): 1-15. DOI: <http://dx.doi.org/10.3989/ris.2017.75.3.15.117>
- Manzano-Arrondo, V. 2017c: Emociaj kialoj por uzi Esperanton. *Tra la mondo* 3: 64.
- Martí, J.J., Martí, M., Vargas, Ó.H. & Moncayo, J.E. 2014: Reflexión sobre los discursos en educación superior, una mirada desde la psicología social crítica. *Revista de la Educación Superior* 43(4): 33-55.
- Martín-Baró, I. 1975: *Elementos de conscientización socio-política en los currícula de las universidades*. Guatemala: FUPAC.
- Martín, E. 2014: Mentiras, inconsistencias y ambivalencias. Teoría de la acción y análisis del discurso. *Revista Internacional de Sociología* 72(1): 115-138. DOI: <http://dx.doi.org/10.3989/ris.2012.07.24>
- McArthur, J. 2011: Exile, sanctuary and diaspora: mediations between higher education and society. *Teaching Higher Education* 16: 579-589. DOI: <http://dx.doi.org/10.1080/13562517.2011.560264>



- MECD 2012: Prólogo. En . MECD (ed.): *Estudio europeo de competencia lingüística EECL. Volumen II Análisis de expertos*. Madrid: Ministerio de Educación, Cultura y Deportes.7-9.
- Meyer, M. 2003: Entre la teoría, el método y la política: la ubicación de los enfoques relacionados con el ACD. En R. Wodak, & M. Meyer (ed.): *Métodos de análisis crítico del discurso*. Barcelona: Gedisa. 35-59.
- Moya, G. 2002: *Esperantismo. Prelegoj kaj eseoj*. Barcelona: Barcelona Esperanto-Centro.
- Muehlenhard, Ch.L. & Kimes, L.A. 1999: The social construction of violence: the case of sexual and domestic violence. *Personality and Social Psychology Review* 3(3): 234-245.
- Naredo, J.M. 2013: Ideología político-económica dominante y claves para un nuevo paradigma. *Revista de Economía Crítica* (16): 108-143.
- Neves, G. 2003: Esperanto kaj socia respondeco. En A. Manero (ed.) *La Deko Logo*. INKO. 81-86.
- New, C. 2001: Oppressed and oppressors? The systematic mistreatment of men. *Sociology* 35(3): 729-748. DOI: <http://dx.doi.org/10.1177/S0038038501000372>
- Oller 2016: Costa Rica debe ser bilingüe. *Periódico digital de Costa Rica La Nación*. <<http://www.nacion.com/blogs/a-fuego-lento/costa-rica-debe-ser-bilingue-espanol-ingles/OCIBRWWAK5-GR3NXFZQNBYLAVPA/story/>>
- Packer, A.L. 2002: El SciELO para nuestras revistas científicas. *Interciencia* 27(6): 274-.
- Postmes, T. & Smith, L.G.E. 2009: Why do the privileged resort to oppression? A look at some in-group factor. *Journal of Social Issues* 65(4): 769-790. DOI: <http://dx.doi.org/10.1111/j.1540-4560.2009.01624.x>
- Pratto, F., Sidanius, J., Stallworth, L.M. & Malle, B.F. 1994: Social dominance orientation: a personality variable predicting social and political attitudes. *Journal of Personality and Social Psychology* 67(4): 741-763. DOI: <http://dx.doi.org/10.1037/0022-3514.67.4.741>
- Quinn, L. 2012: Understanding resistance: an analysis of discourses in academic staff development. *Studies in Higher Education* 37: 69-83. DOI: <http://dx.doi.org/10.1080/03075079.2010.497837>
- Ramírez, S. 2001: *INGLÉS, IDIOMA UNIVERSAL*. <<http://www.eltiempo.com/archivo/documento/MAM-652380>>
- Rapley, T. 2014: *Los análisis de la conversación, del discurso y de documentos en Investigación Cualitativa*. Madrid: Morata.
- Regenbig Group. 2017: *La importancia del inglés en la sociedad actual*. <<http://www.regenbig.es/blog/la-importancia-del-ingles-en-la-sociedad-actual>>
- Roberts, P. 2017: Neoliberalismo impuro: una crítica freireana a las tendencias dominantes en la educación superior. *Rizoma Freiriano* 22: 1-14.
- Rodríguez, J.M. 2017: La praxis de la excelencia universitaria entre la paranoia de sus promotores y la culpa de sus víctimas: hacia la recuperación del deseo docente y la universidad pública. *Teknokultura* 14(1): 85-103. DOI: <http://dx.doi.org/10.5209/TEKN.55047>
- Ruiz, B. 2017: La importancia de aprender inglés desde pequeños. <<http://ingles360.abc.es/abc-news/la-importancia-de-aprender-ingles-desde-pequeno/#.WezsOmi0PIV>>
- Sandoval, E.A. & Aguado, E. 2002: Red de revistas científicas de América latina y el Caribe de ciencias sociales y humanidades. *Reflexión Política* 9(30): 317-322.
- Scollon, R. 2003: Acción y texto: para una comprensión conjunta del lugar del texto en la (inter)acción social, el análisis mediato del discurso y el problema de la acción social. En R. Wodak, & M. Meyer (ed.): *Métodos de análisis crítico del discurso*. Barcelona: Gedisa.105-266.
- Stainer, J. 2017: *La importancia de aprender inglés en 2017*. <<https://www.papora.com/es/blog/la-importancia-de-aprender-ingles-en-2017/>>
- Tedesco, J.C. 2004: Igualdad de oportunidades y política educativa. *Cadernos de Pesquisa* 34(123): 555-572. DOI: <http://dx.doi.org/10.1590/S0100-15742004000300003>
- Teelken, Ch. 2012: Compliance or pragmatism: how do academics deal with managerialism in higher education? A comparative study in three countries. *Studies in Higher Education* 37: 271-290. DOI: <http://dx.doi.org/10.1080/03075079.2010.511171>

- Temple, P. 2005: The EFQM excellence model: Higher education's latest management fad?. *Higher Education Quarterly* 59: 261-274. DOI: <http://dx.doi.org/10.1111/j.1468-2273.2005.00297.x>
- Tom 2016: *9 Razones por las que el Inglés es el Idioma Dominante*. <<https://www.ef.com.es/blog/language/razones-ingles-idioma-dominante/>>
- Turner, J.C. 2005: Explaining the nature of power: a three-process theory. *European Journal of Social Psychology* 35(1): 1-22. DOI: <http://dx.doi.org/10.1002/ejsp.244>
- Universia España 2015: 10 razones para estudiar inglés. <<http://noticias.universia.es/movilidad-academica/noticia/2015/03/09/1121077/10-razones-estudiar-ingles.html>>.
- Vaughan Systems. 2016: *7 razones para aprender inglés*. <<https://grupovaughan.com/a/7-razones-para-aprender-ingles/>>
- Watts, R.J., Griffith, D.M. & Abdul-Adil, J. 1999: Sociopolitical development as an antidote for oppression - theory and action. *American Journal of Community Psychology* 27(2): 255-271.
- Young, I. 2004: Five faces of oppression. En: L. Heldke, & P. O'Connor (ed.): *Oppression, Privilege & Resistance*. Boston: McGraw-Hill.39-65.
- Zutlevics, T.L. 2002: Towards a theory of oppression. *Ratio* 15(1): 80-102. DOI: <http://dx.doi.org/10.1111/1467-9329.00177>